



# *Familia* **ESPERANTO**

*N-ro 46 – februaro 2007*



OFICIALA ORGANO DE RONDO FAMILIA DE UEA – CIRKULAĴO POR ESPERANTLINGVAJ PAROJ KAJ FAMILIOJ

## Vorto de la redaktoro!

Jen nova numero de **Familia Esperanto**, iama *Cirkulaĵo por esperantlingvaj paroj kaj familioj*. De pli ol du jaroj la bulteno de la Rondo Familia de UEA ne aperas. En oktobro 2006, mi proponis min mem kiel nova redaktoro, post jena mesaĝo de Amri Wandel en dissendolisto DENASK-L: "*Nun ni serĉas novan redaktoron, kiu eventuale plu eldonu ĝin en reta versio. Fakte la tasko ne estas tre peza – ĉefe necesas iu kiu kunmetos la materialojn*"

Kelkaj eble miros ke iu kiu neniam partoprenis nek en REF, nek en PSI, nek en IF (ĉefe pro geografiaj kialoj – mi jes loĝas plej norde de Eŭropo), kaj kiu eĉ ne parolas Esperanton kun propra filino, povas iĝi redaktoro de *Familia Esperanto*. Nu, unue ne svarmis la kandidatoj! Due, Esperanto estas pontolingvo inter mia rusa edzino kaj mi, etna franco. Same mi deziras ke tiu ĉi bulteno uzu Esperanton kiel ponton inter kulturoj. Tial vi trovos en tiu ĉi *FE* artikolojn kiuj ne rilatas al Esperanto sed jes al familia vivo.

*Familia Esperanto* estas inda sukcesanto de la Cirkulaĵo, kaj tial mi decidis daŭrigi numeradon nur laŭ la *Cirkulaĵo*, tiel ke vi nun tenas la numeron 46 de la bulteno. Mi ankaŭ forigis la mencion "neregula", kaj jes forte esperas ke mi, kun via helpo, sukcesos teni la ritmon kiun mi mem decidis: unu numero en februaro, unu en junio, unu en oktobro. *FE* aperas nun en PDF-formato, kaj elŝuteblas senpage el la reto. Tamen gravas por la redaktoro scii kiom da homoj interesiĝas pri la revuo, kaj mi tial instigas vin retpoŝte abonon, t.e. komuniki vian intencon elŝuti ĉiujn numerojn de la revuo kiuj aperos en la retejo de Ronda Familio en 2007. Tio certe ludos rolon en mia deziro pluresti redaktoro...

Laŭ esprimo de Amri Wandel, tiu ĉi numero de *Familia Esperanto* estas eksperimenta. Mi nun pruvis ke eblas eldoni ĝin rete. Venonta demando estas ĉu ĝi respondas al bezono aŭ deziro de esperantaj familioj. Tian respondon **vi** povas doni. Ne maltrafu la okazon! Retpoŝtu al la redaktoro pri tio kion vi ŝatis kaj tio kion vi malpli ŝatis en tiu ĉi numero. Mi atendas viajn leterojn...

**Claude ROUGET**

## Enhavo

### Pasintaj aranĝoj

Raporto pri Internacia Festivalo .....	3-4
Retrorigardo pri novjaraj aranĝoj ....	4
Raporto pri Novjara Renkontiĝo ....	5-6

### Estontaj aranĝoj

Paskaj familiaj renkontiĝoj .....	7
Infana Internacia Kongreseto .....	8

### Por infanoj

La princino sur pizo (Andersen) .....	9
Ruĝkapuĉetolino (Perrault).....	10-11
Porinfanaj versaĵoj .....	11
Libroj kaj filmoj .....	12

### Esperantaj familioj

Familio Díaz en Kubo .....	13
Trigeneracia esperantistino .....	14

### Multlingveco

Kiel denaske? .....	15-16
---------------------	-------

### Familia vivo

Festo: 17-a de majo en Norvegio .....	17
UNICEF: raporto pri infana bonfarto	18

### Diverse

Kalendaro kaj mallongaĵoj .....	19
La novaj vizaĝoj de Rondo Familia ...	20

**Familia Esperanto**  
estas bulteno por kaj pri  
esperantlingvaj familioj.

**Aperas** trifoje jare: en  
februaro, junio kaj oktobro.

**Redaktofino** ĉi-numera:  
2007.02.27

**Redaktoro**  
Claude Rouget  
[rypev68-fe@yahoo.no](mailto:rypev68-fe@yahoo.no)

**Eldonanto**  
Rondo Familia de UEA  
(A.Wandel, J.Lindstedt,  
B.Schumann, C.Rouget)  
[uea.org/rondo\\_familia/](http://uea.org/rondo_familia/)

**Abonkotizo**  
• libervola pago de 10 €  
al UEA-konto *idoj-p*  
• senpage elŝutebla el  
retejo de Rondo Familia

**Limdato** por kontribuoj  
al venonta numero:  
2007.06.01

## 23-a Internacia Festivalo

La ĉi-jara festivalo famiĝis pro la “akvo de Nepalo”. Ne vere temis pri nepala akvo, sed inter la ĉeestantoj troviĝis partoprenanto el Nepalo kaj dum la magia prezento de la konata magiisto Trixini okazis la famiĝo. Por lia sukcesa magiado li kutime uzis akvon de Paderborn. Tamen nepalano Mukunda havis ideon anstataŭi ĝin per akvo de Nepalo – el Himalajo. Ekde tiam oni utiligis, je ĉiu



okazo, akvon de Nepalo. Pri lia bela lando ni havis okazon konatiĝi dum prelegoj kaj ankaŭ praktiki jogon kun li. alian interesan prelegon kun bildoj pri vojaĝo al Tibeto prezentis Amri Wandel. Same alloga estis lumbilda prezento fare de André Grossmann pri Japanio, kie okazos la venonta UK.

Al la Internacia Festivalo aliĝis 156 partoprenantoj el 20 landoj. Ĉeestis multaj novuloj kiuj ekŝatis la eventon kaj ni esperas, ke ili denove revenos. La programo, kiel kutime, estis abunda kaj varia. La ĉeftemon “Francio” oni prezentis dum la inaŭgura tago per interesa forumo, kie la diversaj partoprenantoj esprimis siajn opiniojn kaj spertojn pri tiu lando. Aldone eblis spekti malgrandan ekspozicion de kelkaj francaj produktoj kaj memoraĵoj el mirinda Francio. Dum aliaj okazoj estis prezentitaj bildoj el diversaj regionoj de Francio kaj alloga serio da lumbildoj pri Luarvalaj kasteloj. Ne mankis prezento pri kastelo Gresillon, kiu apartenas al francaj esperantistoj kaj en kiu okazas diversaj Esperanto-eventoj. Ĉar Francio famas pri vinoj kaj fro-

maĝoj, estis organizita seminario pri francaj fromaĝoj. Cetere kun granda sukceso ni gustumis 15 specojn de ili kun specifa fiodoro kaj kuntrinkante vinojn ni gaje amuziĝis. En alia okazo ni eksciis kiel ginsengo efikas al sano kaj ankaŭ biero helpas tiucele. Dum “Posidelki” ni povis gustumi teon kaj iujn specialaĵojn el Rusio. Ankaŭ bongusta estis uzbeka manĝo “Manti”. Dum aŭtoraj horoj niaj verkistoj subskribis siajn librojn al interesitoj kiuj aĉetis ilin. Iuj interesigis pri “Ĥoĥloma” pentro-arto, pri batiko, aliaj pri “Sudoku”, magiaj seminarioj, pri gimnastiko kaj simile. Pli seriozajn temojn oni traktis en prelegoj pri lingva egalrajteco, pri Renesanco en Italio, pri vivo sur foraj planedoj, pri la metabola sindromo, ĉu Esperanto favorigas multlingvecon kaj aliaj.

La tuttaga ekskurso bone disvolviĝis. Dum la vizito de Strasburgo ni povis admiri ne nur la tipajn kaj bele ornamitajn konstruaĵojn, sed ankaŭ faman kristnaskan foiron.

La vesperaj horoj estis dediĉitaj al kulturaj programoj kaj nokte ni interbabilis en la “Knajpo” ĉe glaso da biero, vino, koktelo aŭ alia trinkaĵo. En la tradicia dancvespero, la 28-an de decembro, ni dancis kaj ĝuis ĉefe polkon. Dum aliaj vesperoj distris kaj plezurigis nin per kantoj Lena Karpunina, JoMo el Tuluzo, Miĥaelo el





Rusio, Solo el Hispanio kaj la grupo Esperanto-Desperado. Ne mankis ŝatata magia vespero kun Trixini. Ĉiuvespere eblis ankaŭ partopreni en societaj ludoj.

Post abunda bufedo, dum la silvestra vespero, ni tostis kaj bonvenigis rusan Novjaron. Per polonezo kaj mazurko-danco estis inaŭgurita la balo. Baldaŭ venis noktaj bondeziroj okaze de Novjaro kaj ĉirkaŭ-brakumado kun kisado.

Ne eblas ĉion priskribi detale. Vi devas veni por konvinkiĝi pri agrabla kunestado, pri bona kaj gaja etoso, sekvi interesajn prelegojn, babili kun novaj kaj jam konataj geamikoj. La venonta okazo por vi estos ĉi-jarfine en Mainz. Ne maltrafu tiun ĉi unikan sperton, kie vi povas ne nur distriĝi, sed ankaŭ kleriĝi kaj amikiĝi. Koran dankon al la organizanto, nia kara HDP kaj liaj kunhelpantoj, kiuj efike laboras por agrabla sukceso de ĉiuj Internaciaj Festivaloj.

**Liba GABALDA**

## Retrorigardo al eŭropaj novjaraj renkontiĝoj

### IS pli granda ol IJK

Antaŭ 50 jaroj unuafoje okazis en la urbo Mainz la Internacia Seminario (IS) de Germana E-Junularo: komuna jarfina tut-semajna E-renkontiĝo por gejunuloj. La IS kreskis, okazante ĉiujare kun alia kadra temo kaj en alia germana urbo. Ĝi havas varian programon: prelegoj, ekskursoj, koncertoj, silvestra balo ktp. Kun la jaroj la IS fariĝis pli kaj pli populara kaj internacia, kvazaŭ la vintra paralelo de la Internacia Junulara Kongreso de TEJO. La IS kreskadis kaj en kelkaj jaroj estis pli multnombra ol la IJK.

### De Seminario al Festivalo

Fine de la sepdekaj partoprenis ĝin pli ol tricent gejunuloj – kaj ne nur gejunuloj, sed ankaŭ la iamaj gejunuloj kiuj intertempe ekhavis familiojn. Pro la aĝa diverseco kaj ĉar fariĝis malfacile trovi ejojn sufiĉe grandajn, leviĝis la ideo disigi la IS-n en du apartajn renkontiĝojn: unu por gejunuloj (IS), kaj alia renkontiĝo, kiu eknomiĝis Internacia Festivalo (IF) por mezaĝuloj kaj familioj. En la tri unuaj jaroj post la divido

la IS kaj IF okazis paralele samloke, sed ekde 1987 la du aranĝoj okazis aparte ankaŭ geografie.

### Novaj aranĝoj: NR kaj AS

En la naŭdekaj la IF rapide kreskis sub la sperta gvido de Hans Dieter Platz (HDP), kaj komence de la 2000aj ĝia partoprenantaro superis 200, laŭ iuj tro granda por konservi la familiecan etoson. Ŝajne maturiĝis la kondiĉoj por nova mitozo en la jarfina E-merkato: post dudekjara hegemonio de la IF aperis en Germanio konkurenca novjara renkontiĝo por mezaĝuloj kaj familioj, kiu portas la originalan nomon Novjara Renkontiĝo (NR).

Evidentiĝis ke la novjara merkato daŭre ne estis sata: kvankam kaj la IF kaj la NR celas proksimume la saman publikon, sume la nombro de partoprenantoj en ambaŭ kreskis al pli ol 300, kun averaĝe po 150 en ĉiu el la du. En la lastaj jaroj aldoniĝis eĉ kvara ebleco – la pola Ago-Semajno (AS), kiu startis modeste en la jaro 2000 kaj plurfoje okazis en la feri-urbo Zakopane, sed ĉi jare signife kreskis al 180 partoprenantoj, unuafoje okazanta en alia loko – Novy Sacz.

**Amri WANDEL**

## 5a Novjara Renkontiĝo

Entute 174 homoj partoprenis en la 5a Novjara Renkontiĝo (NR) de Esperanto-Land, kiu okazis de la 26a de decembro ĝis la 7a de januaro en la germana urbo Trier. Nur ĉirkaŭ dekduo da homoj partoprenis la tutan tempon – la plimulto elektis la tagojn ĉirkaŭ silvestro por festi la novan jaron en internacia rondo.

Kaj fakte, ĉi-foje ĝi estis tre internacia, ĉar ne ekzistis nacio kun plimulto – la plej granda grupo, tiu loĝanta en Germanio, konsistis el 44 personoj aŭ nur kvarono de la tuta partoprenantaro. El Francio, Belgio kaj Nederlando venis po ĉ. tridek homoj kaj entute la gastoj venis el 14 landoj, el Honkongo kaj Kanado, el Israelo, Rusio, Hispanio kaj Hungario.



Régis Larue kaj kiuj kunigis infanojn kaj plenkreskulojn.

## 60 infanoj el ok landoj

Por la sesdeko da infanoj inter kelkaj monatoj kaj 16 jaroj estis ampleksa programo sub la sperta gvido de Christoph Frank. Okazis diversaj laborgrupoj por produkti ludilojn, muzikilojn kaj aliajn objektojn el rubaĵo – ja la kadra temo de la kunveno estis la medio.



Krome eblis partopreni en infana teatro kaj spekti pupteatraĵon de Christoph Frank, "Bello kaj Bella", kun iom da magiaĵo. Dum la "ŝtonfesto" por infanoj kaj ludemaj plenkreskuloj oni devis plenumi diversajn

taskojn kun ŝtonoj – ĵeti menhiron aŭ ekzemple taksi la kvanton de ŝtonoj en botelo. Krome la infana rondo, en kiu troviĝis granda kvanto de denaskuloj, lerte sukcesis amuziĝi ankaŭ ekster la oficiala programo - interalie per la multaj ludoj, kiujn kunportis Ilse Jacques kaj Bernard-

## Pri klimatsanĝiĝo kaj pri "Les bienveillantes"

Sed por la ĉirkaŭ 50 plenkreskuloj, kiuj ne havis infanojn, (kaj eĉ por la gepatroj) eblis ankaŭ fuĝi la infanan mondon kaj sekvi prelegon pri la biologia diverseco, pri bicikla trafiko aŭ pri la klimatsanĝiĝo. Oni povis ekzemple konatiĝi kun Moskvo kaj kun Hamburgo, kun Linukso kaj kun la komunikaj konsiloj de Rosenberg, kun la franca romano "Les bienveillantes" kaj kun Sorobano. Estis kurso pri ventrodanco de Yasmin, pri societaj dancoj de Bart kaj rondo de jogopraktikantoj.

## Por lernantoj kaj instruantoj

Gunter Neue kaj Svetlana Smetanina zorgis pri komencantoj kaj progresantoj en diversaj kursoj kaj oni povis spekti ankaŭ la ĉiam ŝatatan Mazi-filmon. Iwona Kocieba prezentis por instruantoj la retpaĝaron edukado.net, la instrufilmon

"Pasporto al la tuta mondo" kaj manlibron pri instruado.

## "Akordo" kaj "Ĵomart kaj Nataŝa" kun Karina

Vespere okazis du koncertoj, unu de la naŭpersona nederlanda koruso "Akordo", kiu kantas seninstrumente repertuaron de la 15a ĝis la 20a jarcento, de Josquin Des Prés ĝis Leonard Bernstein.



Ĵomart kaj Nataŝa kun sia filino Karina prezentis siajn kantojn, inter kiuj tute freŝa kanto pri la aranĝo mem, pri "NR". La silvestra festo elstaris per bongusta bufedo kaj per diskoteko, kiun lerte aranĝis Dirk De Weerd tiel entuziasmigante la dancemulojn ĝis tre malfrua nokto. Okazis en alia tago muzika vespero kun multaj kontribuoj de partoprenantoj, el kiuj sukcesis surprizi la ĉeestantojn Martin Meyer, kiu muzikis helpe de blindula bastono kaj de monbileto. Krome okazis ankaŭ danca, luda, vingustuma kaj internaciaj vesperoj.

## Ekskurso al Luksemburgio

La tuttaga ekskurso kondukis per trajnvojaĝo al Luksemburgio, kie István Ertl gvidis nin sprite kaj scioplene. Ĉe promeno en Trier necesis distingi verajn kaj falsajn

klarigojn pri la urbo. La tradiciaj novjaraj kaj pliaj promenoj permesis al ni iom sperti la apudan naturon.

## Kafejo

Kiel kutime eble la plej grava loko de la renkontiĝo estis la komuna kafejo, kie oni kunvenis dumtage kaj vespere por babili kaj trinki ion. Entute la etoso dum la tuta renkontiĝo estis tre agrabla kaj amikeca, se juĝi laŭ la komentoj de la partoprenantoj, el kiuj multaj jam anoncis sian deziron refoje partopreni en la venonta 6a Novjara Renkontiĝo de EsperantoLand. Ĝi okazos en la malgranda vilaĝo Föckinghausen apud Meschede, oriente de la Ruhr-regiono.

## Raportoj en gazetoj, radio kaj televido

La granda renkontiĝo ebligis sukcesan gazetaran laboron. Raportis pri la 5a NR kaj pri Esperanto la germana novaĝ-agentejo dpa, pluraj gazetoj - de la loka Trierischer Volksfreund ĝis Basler Zeitung kaj Märkische Oderzeitung -, kelkaj radiostacioj kaj la televido de la regiono Rejnlando-Palatinato.

(teksto kaj fotoj el [esperantoland.org](http://esperantoland.org))



## 23-a PSI en Bonn

2a – 9a de aprilo 2007

Jam la trian fojon ni renkontiĝos en Haus Venusberg en Bonn por **Printempa Semajno Internacia** – PSI. Ĉi-tiu domo estas simple plej konvena, ĉar ĝi ŝajnas kvazaŭ farita por niaj bezonoj kaj bone atingeblas, eĉ la vetero ofte estas bona.

Ĉiu, kiu jam ĉeestis ĉi-tie, scias kion ni celas: la ĉambroj, la ekipaĵo, la bonaj manĝoj, trinkaĵo, ĉio estas ĝusta.

Ankaŭ la atingeblo de Haus Venusberg per publikaj trafikiloj estas bonega.



Do ne ekzistas obstaklo, ĉiu rajtas veni, kompreneble familioj, ankaŭ unuopuloj, maljunuloj restintaj junaj, kaj ĉiuj, kiuj foje deziras sperti Esperanton kaj lerni ĝin.

Ĉi-jara temo estas cirko. Pliajn informojn legu ĉe: [esperanto.de/psi/2007/](http://esperanto.de/psi/2007/)

## Festa Renkonto Internacia de Geknaboj

7a – 14a de aprilo 2007

Se vi aĝas inter 7 kaj 18 jarojn, kaj jam sufiĉe flue parolas Esperanton, emas vojaĝi, malkovri belan regionon de Francio, konatiĝi kun novaj geamikoj, se vi ŝatas muziki, kanti, danci, teatraĵoj, desegni, man-faradi, konstrui... aŭ iel krei belajn aĵojn, tiu semajno ege plaĉos al vi!

Kursgvidantoj, volontuloj, gepatroj kaj geavoj, partoprenu kaj partoprenigu infanojn aŭ gejunulojn en FRINGOJ 2007.

La kastelo Grezjono (okcidenta Francio) jam havas longan tradicion de esperantostaĝoj, ĉu por plenkreskuloj, ĉu por infanoj. FRINGOJ estas novstila por-geknaba semajno kiu sukcese disvolviĝis unuafoje en aprilo 2006. Kompreneble, ĝi celas kontribui al plialtigo de la lingva nivelo, sed

ankaŭ celas evoluigon de la partoprenantoj al pli da komunikemo, aktivemo, kreemo kaj memfido en ĝoja internacia etoso.

Nia programo konsistas el **preparo de granda festo** kun spektakloj, ludoj, ekspozicioj, en kiu ĉiu preparos tion, kion li aŭ ŝi plej ŝatas.

La festo okazos vendrede, la lastan vesperon kaj estos malfermata al ekstera publika, esperantista aŭ ne. Laŭ eblecoj ni venigos posttagmeze klasojn de najbara bazlernejo, por prezentado de Esperanto pere de ludoj.

Pliaj informoj pri la aranĝo legeblas ĉe:

<http://gresillon.org/eventoj/fringoj/>

## PRINTEMPE 2007 – Norda Italio aŭ Kroatio

Nuntempe nek vintras nek printempas, sed eble kelkmomente vi komencas jam revii pri kiel travivi decan printempon en ĝusta sezono, ĉu? EsperantoLand ofertas al vi pasigi unu semajnon, ekde la paska sabato, ĉe la adriatika maro, verŝajne en Italio aŭ Kroatio. Ni prenos domon en trankvila kaj bela loko proksime de la strando. Tie vi povos pasigi ferian semajnon en la kutima EsperantoLand-etoso, profiti de la maro kaj ĝui la sunon en la ĝardeno. Aldone ni ofertas al vi lingvokursojn kaj prelegojn pri Esperanto por kontentigi vian Esperantostudemon, sed ankaŭ vian ludemon kaj babilemon ni certe ne forgesos.

Por povi elekti la grandecon de la domo ni petas vian baldaŭan reagon, ĉu vi ŝatos partopreni tian renkontiĝon. Ĝi okazos de la **7a ĝis la 14a de aprilo 2007**. Taŭgos por familioj kaj unuopuloj de ĉiu aĝo. Ĉiu lingvonivelo estas bonvena. La kotizoj estos ĉirkaŭ 300 € en dupersona ĉambro kun duŝo/necesejo, inkluzive de la manĝaĵo.

Vi povas reskribi al mi per [printempe@esperantoland.org](mailto:printempe@esperantoland.org) aŭ vi respondas ĉi tie por povi diskuti kun aliaj kaj rigardi, kiu jam montris intereson.

Bonvolu doni vian unuan sendevigan reagon ĝis la 15a de februaro por faciligi la planadon kaj certigi vian lokon. Dankon!

elprenita el <http://esperantoland.org/forum/viewtopic.php?t=1041>

## 38a Internacia Infana Kongreseto

4 – 11 aŭgusto 2007,  
Jacugatake en japana montaro

Esperanto-domo en Jacugatake (Yatsugatake) akceptos nin: Ĝi situas ĉ. 170 km okcidente de Tokio kaj Jokohamo en gubernio Yamanashi. La domo (vidu foton) estas posedaĵo de Japana Esperanto-Instituto. Ĝi povas akcepti 15 ĝis maks. 30 personojn. Ekzistas 6 dormĉambroj en 2 etaĝoj kun 15 litoj, inter kiuj ni laŭbezzone



aldonos futonojn. Krome, la 300-kvadratmetra domo havas salonon por kunvenoj, 2-etaĝan bibliotekon (kun televidilo kaj komputilo), kuirejon, banejon kaj duŝejon.

La domo situas en montara regiono, alta pli ol mil metrojn super marnivelo. Ĝin ĉirkaŭas bela pejzaĝo kaj pura aero. La regiono estas turisma kaj fama pro situo de iom unika montoĉeno en ĝi, 2899 metrojn alta. Tiu monto havas ok pintojn kaj ŝajnas kiel ĝemelaj montoj apud unu alia. En la japana lingvo la vorto *Jacugatake* ĝuste signifas ok-montopintoj! (ok = *yatsu*, pinta = *ga-take*) De tie oni povas vidi la monton Fuĵi, 3776 metrojn altan, simbolon de Japanio. Ni provu iom supreniri tiun monton per gvido de loka e-isto, eble merkrede kun kelkaj gepatroj.

Ni forveturas de UK sabate vespere al la domo kaj sekvan sabaton revenas al UK, eble per luata buso. Ni matenmanĝos en la

kuirejo. Por tag- kaj vespermanĝo, ni foje mendas pretan manĝon (lunĉpakaĵon), foje iros al proksimaj restoracioj. La matenon ni planas dediĉi al lingvaj aktivecoj, laŭbezzone Esperanto-kurso. Pri posttagmezaj aktivecoj ni komune decidis. Eblas uzi pilkludejon de apuda domo kaj ludejon de proksima bazlernejo, viziti naĝejon, planetarion, muzeojn, la apudan urbon. La vesperan rakonton laŭtleĝatan ni ankoraŭ ne elektis. Pri tuttaga ekskurso ni decidis poste.

Atentu: Somere, la varmo estas peniga pro alta humideco. La apuda arbaro kaj montara situo mildigos tion. En Jokohamo, la temperaturo en aŭgusto estas ĉirkaŭ 30 °C tage, 25 °C nokte. Pro la forta suno, iuj japanoj portas larĝan ĉapon. Ne estas danĝeraj bestoj, tamen kuloj pikas. La kranakvo estas trinkebla. La manĝaĵoj estas nekutimaj por eŭropanoj: algoj, rizo... Ni planas unu gvidanton por ĉiu kvino da infanoj, estos du japanaj gvidantoj kun ni.

Pri lingvouzo: Ni proponas lingvo-orientitan, kurso-similan aktivecon por tiuj kiuj ne parolas E-on kun la aliaj. Samtempe okazas aliaj kutimaj aktivecoj por tiuj kiuj komunikas en E-o.

### Aliĝilo

Ni akceptas infanojn inter 8- kaj 16-jaraj, kiuj parolas Esperanton; tiuj povas veni el E-familioj aŭ lernejoj klasoj. Pli junaj infanoj bezonas prizorganton, pli aĝaj povas fariĝi helpantoj. Infanoj, helpantoj kaj gvidantoj ricevas aŭtomatan kaj senpagan aliĝon al la UK.

Por aliĝi, kontaktu la administranton kaj UEA-komisiiton pri IIK: retpoŝte al [bert.schumann@free.fr](mailto:bert.schumann@free.fr) aŭ paperpoŝte al  
s-ro Bert SCHUMANN  
9 rue du Couradin  
FR-35510 Cesson-Sévigné  
Francio



# La princino sur pizo

de Hans Christian ANDERSEN

eldanigis F. SKEEL-GIÖRLING

El Fabeloj de Andersen, I, Esperanta Biblioteko Internacia, Dresden, 1909

Estis iam princo, kaj li deziris edziĝi kun princino; sed ŝi devus esti vera princino. Por trovi tian princinon li faris multajn kaj longajn vojaĝojn en la tuta mondo; sed ĉie, kien li venis, li renkontis jen unu jen alian malfacilaĵon. Ekzistis certe sufiĉe da princinoj, sed ĉu ili estas veraj princinoj, li ne povis tuj ekscii; ĉe ĉiu el ili li trovis ion malveran. Fine li revenis domon, kaj li tiam estis tre ĉagrena, kion oni povos bone kompreni, ĉar lia plej sincera deziro estis ja edziĝi kun vera princino.

Ian vesperon la vetero fariĝis treege malbela; fulmadis kaj tonbris kaj senĉese falis de la ĉielo pluvegoj. Nun iu frapis la pordegon de la kastelo, kaj la maljuna reĝo iris por malfermi.

Ekster la pordego staris princino. Sed, ho ĉielo, kian aspekton ŝi havis! De ŝiaj haroj kaj de la vestaĵo gutegis la akvo; ĝi tute trafluis ŝiajn ŝuojn kaj elgutadis el la kalkanumo, kaj dum ŝi staris ĉi-tie en la pluvego ŝi diris, ke ŝi estas vera princino.

Nu, ĉi-tion ni facile ekscios! pensis la maljuna reĝino; ŝi nenion diris sed iris en la dormoĉambron, kaj forpreninte la tutan litaĵon ŝi metis pizon sur la fundon de la lito. Ŝi prenis nun dudek matracojn, metis ilin sur la pizon, kaj sur la matracojn ŝi plie metis dudek kusenejojn, faritajn el la plej mola lanugo, kiu ekzistas.

En ĉi-tiu lito la princino devis dormi nokte. Je l' mateno oni ŝin demandis, kiel ŝi dormis.

"Ho, malbonege!" la princino respondis, "mi preskaŭ ne ripozis la tutan nokton, kaj mi ne komprenas, kio troviĝis en la lito."

"Mi kuŝis sur ia malmolaĵo, kaj mia tuta korpo fariĝis bruna kaj blua. Estas tre malagraba kaj stranga okazo!"

Nun oni povis kun certeco scii, ke ŝi estas vera princino, ĉar la pizon ŝi estis eksentinta eĉ malgraŭ la dudek matracoj kaj la dudek kusenejoj kun la plej mola lanugo kiu ekzistas. Neniu ol vera princino povus posedi tian mirindan sentemon!



Foto: Hilde Nilsen, kiu mem kudris la tuton!

Post ĉi-tio la princo edziĝis kun ŝi, ĉar li ja scias, ke lia edzino estas vera princino, kaj la pizon oni enmetis en la muzeon de la reĝo. Tie ĝi troviĝas ankoraŭ nun se neniu ĝin forŝtelis.

(el retejo de Donald J. HARLOW)

Ĉu vi deziras aŭskulti *La princinon sur la pizo*? Ĝi estas senpage elŝutebla (en MP3-formato) el la retejo de Espen Stranger-Johannessen pri projekto de sonlibroj en Esperanto: [www.geocities.com/sonlibro/](http://www.geocities.com/sonlibro/)

Tie troviĝas tri aliaj laŭtlegitaj fabeloj de H.C. Andersen.

## Ruĝkapuĉetolino

el la Blua Felibro de Andrew LANG  
elangligis Donald J. HARLOW

En unu vilaĝo iam loĝis eta kamparanino, la plej bela estaĵo iam ajn vidita. Ŝia patrino tre amis ŝin; kaj ŝia avino eĉ pli amis ŝin. Tiu bonulino faris por ŝi etan ruĝan kapuĉon; kiu tiel beligis la knabinon, ke ĉiu nomis ŝin Ruĝkapuĉetolino.

Iun tagon ŝia patrino, farinte kelkajn laktovaĵojn, diris al ŝi:

"Iru, kara, por kontroli ĉe via avino, ĉar mi aŭdis, ke ŝi tre malsanas; portu al ŝi laktovaĵon kaj ĉi tiun poteton da butero."

Ruĝkapuĉetolino tuj ekiris por viziti la avinon, kiu loĝis en alia vilaĝo.



Irante tra la arbaro, ŝi renkontis Avĉjon Lupo, kiu tre volis manĝi ŝin, sed tion li ne kuraĝis pro la proksimeco de kelkaj lignotondistoj en la arbaro. Li demandis al ŝi, kien ŝi iras. La kompatinda knabino, ne sciante ke estas danĝere resti kaj aŭskulti lupon, diris al li:

"Mi iras por viziti mian avinon kaj porti al ŝi laktovaĵon kaj poteton da butero de mia panjo."

"Ĉu ŝi loĝas longe for?" diris la Lupo.

"Ho! jes," respondis Ruĝkapuĉetolino; "preter tiu muelejo, kiun vi povas vidi, ĉe la unua domo en la vilaĝo."

"Nu," diris la Lupo, "ankaŭ mi iros por viziti ŝin. Mi iros per dekstra vojo, vi iru per maldekstra, kaj ni vidu, kiu la unua atingos ŝian domon."

La Lupo ekkuris kiel eble plej rapide, sekvante la plej mallongan vojon, kaj la etolino sekvis la plej longan, distrante sin per kolekti nuksojn, persekuti papiliojn, bukedigi floretojn. Post nelonge la Lupo atingis la hejmon de la maljunulino. Li frapis ĉe la pordo – frap, frap.

"Kiu estas?"

"Via nepino, Ruĝkapuĉetolino," respondis la Lupo, falsante ties voĉon; "kiu alportas al vi laktovaĵon kaj poteton da butero senditajn al vi de panjo."

La bona avino, kiu estis en la lito pro malsaneto, elkriis

"Tiru la fadenon, la pordotenilo leviĝos."

La Lupo tiris la fadenon, kaj la pordo malfermiĝis, kaj li tuj ekfalis sur la bonulino kaj en daŭro de momento formanĝis ŝin, ĉar jam tri tagojn li tute ne manĝis. Li tiam fermis la pordon kaj eniris la liton de la avino, atendante Ruĝkapuĉetulinon, kiu iom poste alvenis kaj frapis ĉe la pordo – frap, frap.

"Kiu estas?"

Ruĝkapuĉetolino, aŭdante la fortan voĉon de la Lupo, komencis timi; sed, kredante ke la avino suferis malvarmumon kaj pro tio raŭkis, ŝi respondis:

"Jen via nepino, Ruĝkapuĉetolino, kiu alportas al vi laktovaĵon kaj poteton da butero, kiujn panjo sendis al vi."

La Lupo elkriis al ŝi, moligante kiom eble plej sian voĉon:

"Tiru la fadenon, kaj la pordotenilo leviĝos."

Ruĝkapuĉetolino tiris la fadenon, kaj la pordo malfermiĝis.

La Lupo, vidante ŝian eniron, diris al ŝi dum li kaŝis sin sub la kovriloj:



"Metu la laktovaĵon kaj la poteton da butero sur la tabureton, kaj venu kaj ekkuŝu apud mi."

Ruĝkapuĉetolino senvestigis sin kaj enlitiĝis, kie, mirante pri la aspekto de la avino en la dormvestaĵoj, ŝi diris al tiu:

"Avino, tiom grandaj estas viaj brakoj!"  
– Tiom pli bone por brakumi vin, kara."

"Avino, tiom grandaj estas viaj kruroj!"  
– Tiom pli bone por kuri, kara."

"Avino, tiom grandaj estas viaj oreloj!"  
– Tiom pli bone por aŭdi, kara."

"Avino, tiom grandaj estas viaj okuloj!"  
– Tiom pli bone por vidi, kara."

"Avino, tiom grandaj estas viaj dentoj!"  
– Tiom pli bone por manĝi vin."

Kaj, tion dirinte, tiu fia lupo ekfalis sur Ruĝkapuĉetulinon kaj tuj formanĝis ŝin.

elŝutita el <http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/literaturo.html>

## Porinfanaj versaĵoj

\*\*\*

Linjo, Linjo,  
Ni estis ĉe avinjo.  
Manĝis ni kaĉon,  
aŭdis ni klaĉon.  
Bone promenis  
Kaj hejmen revenis.

\*\*\*

- Korniko, korniko, diru  
elkore,  
kien vi veturis?  
- Ho, mi flugis foren,  
mi kuiris kaĉon -  
jen infanoj maĉas.  
Al tiu mi donis,  
kaj al tiu ne donis:  
li kaĉon ne preparis,  
li nenion faris.

\*\*\*

Hej, kokcino,  
Flugu al ĉielo!  
Tie viaj idoj  
ĉe tablo sidas,  
manĝas bombonojn,  
sed al vi ne donas!

\*\*\*

(tr) **el Agnia Barto**

Nia Tanjo laŭte ploras -  
En rivero pilko foras.  
Vanas ploro kaj sufero -  
Pilk' ne dronos en rivero.

\*\*\*

(tr) **Daniil Harms**

Muso al musido diris:  
- Bonajn librojn mi akiris!  
Legi ilin mi ne povas,  
Sed la guston bona trovas.

\*\*\*

**Jurij Jakovlev**  
(tr) Lulkanto de ursino

Neĝon kulerante  
Nokto venas granda  
Tra severa griza nebul'.

Dormas jam najbaroj -  
Blankaj ursoj maraj,  
Dormu ankaŭ vi, etul'.

Sur glacia plato  
Kvazaŭ sur fregato  
Longas nia vojo en mar'.


Kaj al ŝipoj kurson  
Blankaj stelaj ursoj  
Lumas el ĉiela klar'.

kolektitaj de  
**Sergej VERŠININ** ĉe:  
[www.helsinki.fi/~jslindst/versvers.html](http://www.helsinki.fi/~jslindst/versvers.html)

## Legindaj libroj kaj spektindaj filmoj

### Legajtoj ŝatataj en Kubo

En la frua aĝo, mia 11-jara filo tre ŝatis *Plupo kaj la maro*, *La tri ursoj*, *La multkolora kateto*; estis ankaŭ aliaj.




Poste li preferis bildstriojn *Asteriks ĉe la olimpiaj ludoj*, *La nigra insulo* (Tinĉjo) kaj *Cisko kaj Vinjo* – *La brusela bubo*. Ni ne disponas je multaj porinfanaj libroj, pro la malablo aĉeti, kaj temas pri donacoj de amikoj. Nuntempe, mia plej aĝa filo interesiĝas pri *Originala Esperanta Bildvortaro* de Sylla Chaves. Ĝi ne estas ĝuste porinfana libro, sed li tre ŝatas esplori pri vortoj kun la koncerna bildo.

**Norberto DÍAZ GUEVARA**

### La arbo ...kiu forkuris

Ekologio lastatempe fariĝis denove grava temo. Tial indas repreni el bretaro unu el miaj preferataj infanlibroj en Esperanto, verkita originale en E-o kaj japana.

Martin Burkert sukcesis per plaĉaj desegnoj kaj simpla teksto vekti intereson pri urba ekologio. Malmulte da paĝoj, sed bela kaj moderna fabelo, kiun ŝatos ĉiuj infanoj kaj gepatroj medikonsciaj. La libro daŭre aĉetblas ĉe UEA.




### Interbiblioteka pruntado

Ĉu eblas prunti librojn el aliaj urbaj bibliotekoj en via lando? En Skandinavio, eblas. Tio gravas por ni, esperantistoj, ĉar libroj en la internacia lingvo kutime ne abundas en lokaj bibliotekoj. Urba biblio-

teko de Göteborg havas miascie unu el la plej bonaj kolektoj: 42 titoloj por infanoj kaj junuloj (el pli ol 800 libroj en Esperanto). Ĉiuj libroj prunteblas el iu ajn publika biblioteko de Skandinavio (eble ankaŭ el via lando – informiĝu!). Vidu libroliston ĉe [www.gotlib.goteborg.se/search~S1\\*swe/](http://www.gotlib.goteborg.se/search~S1*swe/); skribu "esperanto" kaj alklaku "Sök".

### La profetio de ranoj

Mi malkovris tiun ĉi filmon (DVD) en mia loka biblioteko, hazarde. Ĝi ne estas en Esperanto, nek rilatas al la internacia lingvo. Sed la temo jes valoras ke vi pasigu horon kaj duonon kun via infano por spekti tiun miraklan desegnofilmon de Jacques-Rémy Girerd (2001).



Tiu moderna versio de arko de Noah estas nur kadro de fabelo pri solidareco kaj necesa reciproka helpo kaj fido. Bela kaj humurplena filmo kiu same multe plaĉis al mia filino kiel al ŝia patro...

### Populara muziko el Vittula

Por niaj esperantaj gejunuloj, jen filmo amuza kaj en kiu Esperanto ludas etan rolon. Temas pri sveda filmo laŭ romano de Mikael Niemi *Populara muziko el Vittula* (2001), kiu sprite rakontas problemojn de junularo en fora sveda urbeto ĉe limo de Finnlando komence de 1960-jaroj. Min ridigis kiam pastro el Kongolando vizitas la urbeton, kaj senespere provas komuniki kun la aŭskultantaro en angla, franca, araba... kaj en Esperanto, kiun iu knabeto iom posedas pro aŭskultado de esperantokurso en sveda radio. Knabo verdire ne scias multe pli ol "Kiel vi fartas? Mi bone fartas", sed la situacio en preĝejo vere humurplenas!

Supozeble la filmo (DVD) jam troviĝas en diversaj lingvaj versioj, kaj certe vi kaj viaj plej aĝaj infanoj pasigos bonan momenton pro tiu amuza (sed ne stulta) filmo.

**Claude ROUGET**

## Denaskeco en Kubo

Konatiĝinte kun Esperanto en 1986, mi ĉiam havis la ideon esperantigi mia(j)n filo(j)n, sed tio ne realiĝis ĝis la fino de 1995, kiam naskiĝis mia unua filo, Norberto José. Unu jaron antaŭe dum laborkunsido de Kuba Esperanto-Asocio en mia urbo, Sancti Spiritus (kiu troviĝas en la centro de Kubo), mi renkontis mian nunan edzinon, Yoandra Isabel Rodríguez Labrada – en Kubo estas kutimo uzi du personajn kaj du familiajn nomojn! – kiu jam de 1992 rilatiĝis al Esperanto.

Sed manke de informoj kaj rekomendoj pri dulingveco, mi troviĝis antaŭ dubmuro, kiu tamen iom post iom komencis dispeciĝi kiam kelkaj tekstoj alvenis al miaj manoj. Mi devas mencii kaj laŭdi la retliston Denask-L, de Jouko Lindstedt, ĉar ĝi riĉigis miajn spertojn. La rezulto de ĉio estis, ke mi aplikis mian propran metodon, kies kerno estis ne elmontri al la infano, ke li faras ion eksterordinaran. Kaj mi de tiam aliĝis al ja eksterordinara mondo!



Mi alprenis la regulon unu-lingvo-unu-homo, tiel, ke ĝis la tria jaro de mia filo, nur mi uzis la lingvon kun li. En tiu momento ni planis partopreni nacian renkontiĝon, kaj mi decidis, ke ankaŭ la patrino utiligu la lingvon en niaj dialogoj. Mi celis, ke li ne sentu sin ŝokita, ke aliaj homoj scipovas tiel interkompreniĝi. La rezulto estis kontentiga, kaj dum la evento, mia filo senprobleme rilatiĝis al aliaj esperantistoj inkluzive eksterlandanoj parolante Esperanton.

Sed en Kubo estas tre malofta la dulingveco en la frua aĝo, kaj en la kazo de Esperanto la afero estas pli drasta. En Havano loĝas Ariadna, filino de Maritza Gutiérrez (UEA-estrarano pri Landa Agado), kaj de Alejandro García. Ŝi estas 15jara kaj

flue uzas la lingvon. Laŭ miaj scioj estis du pliaj kazoj en antaŭaj jaroj (la infanoj estas nun junuloj, kaj restas apartaj de la movado). Lastatempe en Guantánamo estas du kazoj, sed bedaŭrinde pro diversaj kialoj la infanoj perdis la rilaton al la lingvo. En Camagüey loĝas infano, kies patro estas esperantisto. Sed en Kubo la distanco estas granda barilo, kaj krome, la aĝoj de la infanoj estas diversaj.

Mia filo plu uzas la lingvon en la familio kaj okaze de renkontiĝoj. Sporade venas eksterlandaj esperantistoj, kaj tiam la interkompreniĝo estas senproblema.

En novembro 2004 naskiĝis mia dua filo, Carlos Ernesto, kiu ekde la unuaj momentoj aŭdis la lingvon de la patrino kaj de la frato. Nun li senĝene intervenas en dialogoj, kaj havis la ŝancon jam partopreni renkontiĝon de esperantistoj. Li bone rilatiĝis. Por mi estas tute klare, ke la ekzisto de juna frato jam konanta Esperanton, donas al li pli bonajn ŝancojn alproprigi al si la lingvon pere de ludoj kaj aliaj infanaj okupoj.

La maloftaj kontaktoj kun alilandaj esperantistoj, kaj la maleblo facile vojaĝi estas fortaj malhelpiloj en la Kuba esperanta denaskeco, ĉar la infanoj estas plejparte apartaj de la ĝenerala kaj kutima lingvouzo. Tamen, ili sukcesas bone interkompreniĝi kun scipovantoj de la lingvo.

Ankoraŭ estas frua momento por aserti, ke miaj filoj plu uzos Esperanton, sed mia 11jarulo, kiu baldaŭ studos en la notinde temporaba mezlernejo, havas bonan sintenon al la lingvo kaj al la movado, kaj li tre entuziasmiĝas okaze de renkontiĝoj. La dujarulo sekvas liajn paŝojn, kaj ni esperas plu resti tuta Esperanta familio!

Mi volas danki la publikaĵon Familia Esperanto, kiun ni komencis ricevi antaŭ kelkaj jaroj, kaj kiu “kontraŭ vento kaj marondego” venkas malfacilaĵojn en la streboj esti ligilo por la Esperantaj familioj de la tuta mondo.

Korajn salutojn el la Kariba insulo.

Carlos Ernesto (2-jara)  
Norberto José (11-jara)  
Yoandra Isabel Rodríguez  
Labrada  
**Norberto DÍAZ  
GUEVARA**  
(aŭtoro de la artikolo)



## Jenny – la triageracia esperantistino

Georgo Argyle Ferguson, skota pastro de preĝejo unitariana, edzo de Edith Homer kaj patro de Georgo kaj Alice, ĉeestis la Trian Universalan kongreson de Esperanto en Cambridge (Kembriĝo), Anglio en 1907. La UK-n ĉeestis ankaŭ D-ro Zamenhof.

Dum la 30-aj jaroj Georgo persvadis sian filinon Alice lerni Esperanton por la UK en Londono (1938). Li promesis, ke se ŝi sukcesos, ŝi povos vojaĝi kune kun li dum la kongresa ekskurso al Edinburgo, Skotlando. Bona instigo!

Alice edziniĝis al Frank Bagguley en 1936 kaj ankaŭ li studis la lingvon. Ili membriĝis al la londona E-klubo, instruataj se s-ino Saxl, bona instruistino de la Cseh-metodo. Dum la dua mondmilito ili korespondis kun sinjorino en Dresdeno (al kiu ili sendis manĝpakaĵon) kaj kun juna ŝufabrikisto en Romans sur Isère, Drôme, Francio. Post la milito ili korespondis ankaŭ kun juna ĉina maoisto.

En 1947 gastis ĉe ni Jean Asqueri kaj lia amikino kaj ili invitis nin al Francio. En 1949 ni entreprenis la grandan aventuron vojaĝi eksterlanden. Jam komencinta lerni la francan lingvon mi entuziasmis pri la eblo praktiki ĝin kaj lerni pli. Tamen, anstataŭ la franca Jean instruis al mi Esperanton per la lernolibro “Esperanto por infanoj” de S. Soloman. Avide konatiĝante kun familio Muso kaj esprimante kelkajn vortojn al klubanoj mi vere surpriziĝis kiam alvenis aŭtobuso plena je skandinavoj kiuj ankaŭ parolis Esperanton.

Tiel interesiĝinta pri lingvoj mi studis la francan, germanan kaj latinan en la lernejo kaj ĉe universitato Southampton, kie mi renkontis mian edzon. Post la diplomiĝo kiel instruistoj kaj post kiam mia edzo gajnis stipendion por studi ĉe universitato Harvard en Usono, ni loĝis tri jarojn tie. Kiel eksterlandano mi ne havis eblecon instrui en Massachusetts, sed mirakle trovis trimonatan kurson de Esperanto, gvidota de Humphrey Tonkin – nova prelegisto pri la angla lingvo. Mi tre ĝuis la kurson, sed pro manko de vivosento mi ankoraŭ ne konvinkiĝis pri la valoro de Esperanto. Tion mi rekonis en 1987 (loĝinta jam en Cambridge). Mi laboris kiel instruisto de la germana lingvo por plenkreskuloj kaj poste kiel organizinto de interŝanĝoj komunumaj kun kolegoj de niaj ĝemelurboj kaj distriktoj en Germanio, Francio, Tunizio. La malfacilaj komunikebloj vere konvinkis min pri la valoro de Esperanto. Ekde tiam mi decidis studi kaj diskonigi Esperanton kiom eble plej multe. Sed, bedaŭrinde, miaj infanoj – ankoraŭ – ne sekvas min!

**Jennifer BISHOP**



## Familiece en Aŭstralio

Inter la 7-a kaj la 19-a de januaro 2007 okazis en Hobarto (Tasmanio) la 22-a Aŭstralia Somerkursaro de Esperanto. Ĉeestis ĝin pluraj esperantistoj, ĉe kiuj Esperanto ne nepre estas familia lingvo, sed certe familia afero kaj almenaŭ du membroj de la familio interesiĝas pri ĝi. Vidu la liston de ili:

- Stephen Pitney, liaj filo William kaj filino Kara;
- Heather kaj Ivan Heldzingen kaj ilia nepo Michael
- Jenny kaj Alan Bishop

- Merradean Pettit, ŝiaj filinoj Ruby kaj Charlotte
- Hazel kaj Paul Green
- Katja kaj Trevor Steele
- Elrae kaj John Adams
- Carol kaj Brendan Linnane
- Beth kaj Max Wearing
- Franciska Toubale kaj Bernardo Heinze
- Igor Couto kun Tim Wade-Ferrell kaj lia fratino Beth
- gefratoj Miranda kaj Andrew Lutz
- fratoj Jamie kaj Ryan O'Connor
- Shirley Gradusov kun nepino Jennifer informis **Katja STEELE**

## Kiel denaske?

Anstataŭ kutiman demandon “Kial denaske?”, kiu jam estas plurfoje respondita en Esperantujo, mi dezirus nun respondi la demandon “Kiel denaske?”, ĉar al mi ŝajnas ke tiu demando estas eble eĉ pli grava por tiuj kiuj deziras instrui Esperanton denaske al siaj infanoj (aŭ nur pripensas ĉu tion fari). Certe estas multe pli facile decidi kaj fari ion kiam oni scias kio atendas ilin, kiuj problemoj, duboj, miskomprenoj ktp. troviĝas survoje antaŭ ili. Bedaŭrinde, respondoj al tiu demando “kiel” nur tre malfacile troveblas (se entute) kaj mi deziras per tiu ĉi artikoleto almenaŭ komenci ŝtopigon de tiu granda truo.

Do, ni supozu ke vi serioze pripensas ĉu denaske instrui Esperanton al via infano. La unua malfacila paŝo estas jam antaŭ vi – **la decido**. Kiam oni jam decidis, sekvas ankoraŭ unu grava kaj ne vere facila paŝo – **la komenco**. Ni supozu ke vi sukcese trapasis tiujn du gravajn punktojn kaj nun venas tempo de **ĉiutaga apliko** de la lingvo. Se vi jam ne faris tion, plej verŝajne vi ne povas imagi kiuj situacioj povas esti pli komplikaj en ĉiutaga vivo – publika parolado kun infano, aĉetumado, infanĝardenumado, vizitoj al neesperantistaj familioj, rilatoj kun neesperantistaj parencoj (kutime ĉiuj ja estas tiaj) aŭ eĉ familianoj, fabeloj, kantoj, infanaj demandoj. Kaj kvara paŝo kiu estas same grava – **via esperantoparolanta infano**. Foje li/ŝi tute ne emas paroli la lingvon, foje emas sed kun malĝustaj homoj (parolas esperanton kun siaj neesperantistaj amikoj, sed dum E-aranĝon parolas nur alian denaskan lingvon). Mi ne povas oferti universalan helpon en ĉiuj tiuj situacioj, sed mi povas almenaŭ rakonti pri miaj spertoj kiuj eble povas helpi al vi. Ĉiu homo estas diversa, sed kelkajn aferojn oni povas tamen plurfoje apliki.

Por pli bone klarigi al vi nian situacion unue mi deziras priskribi nian familion. Mia edzino, Daŝa, ankaŭ estas esperantistino kaj parolas la lingvon jam 7 jaroj (mi parolas Esperanton ekde la jaro 1986) kio multe plifaciligas la aferon. Kun nia filo Vedran (nun 4-jaraĝa) Daŝa parolas tutan tempon kroatlingve (esperante nur dum E-aranĝoj kaj kiam Vedran direkte postulas ke ŝi parolu ĝin ... jes, foje ankaŭ tio okazas!) kaj mi parolis kun li Esperanton en ĉiuj

vivsituacioj kaj sen esceptoj post lia tria monato.

### La decido

Tio estas via tasko. Pripensu bone ĉu vi vere emas fari tion, diskutu la aferon kun via partnero, parolu kun tiuj kiuj jam instruis denaske Esperanton. Sed, la decido estas nur via kaj de via partnero.

### La komenco

Kiam komenci? Malfacila demando. Kelkaj komencas paroli Esperanton jam kun nenaskigita infano, kiam li/ŝi ankoraŭ kuŝas en la ventro de patrino. Kelkaj komencas tuj post la naskiĝo. Mi bezonis iomete pli da tempo por decido kaj kiam mi decidis mi diris al mi mem kaj mia edzino: “Ekde 15a de marto mi parolos nur esperante kun nia filo.” Li havis tiam iomete pli ol 3 monatoj.

Unu problemo kiu povas okazi estas “promeso kiun oni ne tenas”. Do, oni decidus paroli nur esperanton, sed oni tion ne faras ĉiam aŭ tute ne. La sola helpo estas konsilo “Kiam vi decidis ion, faru tion vere kaj elkore.”

La alia problemo estas parolado al infano kiu, je tiu momento, nek povas kompreni vin nek respondi. Mi sentis min iomete stulte je tiaj momentoj, mi devas konfesi. Unue, al mi mankis la vortoj per kiuj mi povus trankviligi unu plorantan bebon, esprimi amon aŭ amuzigi lin dum ŝanĝo de vindotukoj. Mi neniam antaŭe havis la ŝancon uzi Esperanton en tiaj situacioj kaj verŝajne ankaŭ vi ne. Sed, estu pacienca kaj daŭrigu uzi tiujn vortojn kiujn vi konas kaj lernu novajn. Post iom da tempo aferoj iĝos pli facilaj kaj vi parolos aŭtomatike. Post iom da tempo vi verŝajne tute aŭtomatike komencos uzi Esperanton eĉ parolante kun aliaj infanoj (oni verŝajne ridos kaj rigardos vin iomete strange, sed ne gravas) kaj vi devos bone koncentriĝi en tiuj situacioj.

### Ĉiutaga vivo esperantlingve

Kelkaj el vi havas ŝancon uzi Esperanton ĉiutage. Tiuj lingvospertuloj jam scias esperantajn vortojn por ĉiuj aĵoj kiuj rilatas al infanoj (vindotukoj, rasliloj, suĉumoj, balanciiloj ktp.), kuirejiloj (per kio infanoj tre ofte emas ludi), vestajpartoj (“infan-

skafandroj” ...) kaj multe, multe pli. Kiam infano iĝos pli granda tiam vi tutcerte foje devos foliumi tra vortaro – kiel nomiĝas tiu birdo, kiel nomiĝas tiu parto de la aŭto, kiel tiu floro ... Demandoj venas senĉese kaj estas bone respondi al ili. Mi ne kunportis tutan tempon vortaron kun mi, sed mi portis etajn pecojn da papero kie mi notis mankantajn vortojn kiujn poste mi serĉis en vortarojn. Foje oni ne povas trovi iun vorton (ekz. se temas pri iu loka manĝaĵo aŭ io simila) – tiam vi libere esperantigu la vorton el via nacia lingvo kaj uzu ĝin tiel. Do, tipa kroata manĝaĵo kiu nomiĝas “mlinci” ekestis en nia hejma lingvo “mlincoj”.

Kion fari en publiko? Vi estas meze de plenplena vendejo kaj via infano demandas vin ion – ĉu respondi esperante aŭ tamen nacilingve? Vi vizitas viajn parencojn (kiuj eble pensas ke via decido instrui esperanton denaske estas stranga) kaj vi devas ankaŭ tie paroli kun la infano – esperante aŭ alie?

Denove, la decido estas via. Sed, mi pensas ke estas pli facile por vi mem (kvankam eble ne aspektas tiel) kaj por la infano ke vi **ĉiam** parolu kun li/ŝi esperante. Por vi, ĉar vi ne devas pensi “en kiu lingvo mi parolu nun?” kaj esperantaj vortoj mem eliras el via cerbo kaj buŝo. Por la infano, ĉar li/ŝi tutan tempon ricevas de vi vortojn en nur unu lingvo kaj tiel, almenaŭ laŭ mi, estas pli facile distingi inter la lingvoj.

Foje tia parolado estis laciga, foje mi malagrabla sentis min parolante esperanton ie kie oni ne emas tion, foje aspektas maldece paroli kun la infano esperante kiam aliaj personoj kiuj ne komprenas esperanton estas kun ni sed mi neniam aŭdis ajnan malagrablan vorton rilate al esperanto kaj nia uzo. Foje oni demandis min, en la vendejo, infanĝardeno, ĉe amikoj, surstrate, kiun lingvon mi/ni parolas kaj post la respondo oni kutime demandis pli “Interese, kaj kiel tio funkcias, kiel oni diras tion aŭ ion alian, diru pli pri la lingvo ktp”. Ĉiukaze, vi devas alkitimiĝi al tio ke vi ne estos tutsama kiel aliaj kaj kiam tiu fakto sonas nature kaj agrable al vi tiam venos fino de tiuj problemoj. Ĉi tie validas la sama diraĵo kiel kun multaj aliaj aferoj en la vivo: “Esti malsama ne estas facile, sed estas pli interese/amuze/utile (daŭrigu mem la liston).”

Ankoraŭ unu konsilo – uzu la spertojn de aliaj! Jam ekzistas multaj infankantoj, rakontoj, bildvortaroj je Esperanto. Uzu ilin!

Demandu konatulojn, legu bultenon *Familia Esperanto*, serĉu je interreto artikolojn pri la temo! Se vi trovas ion kio tre plaĉas al vi en alia lingvo, tiam traduku vi mem!

## Via infano kaj Esperanto

Ideo ja estas konata: kun niaj samnaciuloj ni parolu nian nacian lingvon kaj kun eksterlandanoj (kompreneble, tiuj kiuj parolas Esperanton) ni parolu Esperanton. Sed kun infanoj tio kutime aspektas alie. Egalas kiel multe kaj forte kaj bone ni instruis la lingvon, tre ofte okazas ke infanoj faras diverse. En ĉiutaga familia vivo estis kutimo ke nia filo respondis al mi kroatlingve (kun enmetitaj esperantaj vortoj) kaj foje ankaŭ esperante (kun enmetitaj kroataj vortoj). Sed dum E-aranĝoj ofte okazis ke li tute ne deziris uzi esperanton ... la ĝustan kialon ni ne scias, sed ŝajnis ke li iomete hontis paroli esperanton antaŭ multaj nekonataj homoj (do, E-aranĝojn ankaŭ partoprenis niajn amikojn kaj konatulojn, sed nekonatuloj estis pli multnombraj). Kaj post tiaj aranĝoj nia filo subite ekdeziris paroli Esperanton kaj parolis ĝin multe pli ofte ol kutime. Ankaŭ okazis ke kiam mi forestis li foje postulis ke panjo parolu Esperanton kun li ... ŝajnas ke mankis al li esperantlingva komunikado.

## Kaj nun?

Vedran baldaŭ estos 4-jaraĝa kaj antaŭ kelkaj monatoj mi komencis paroli kun li ankaŭ kroatan kaj nun mi ĉiutage kun li parolas miksaĵon de ambaŭ lingvoj – foje kroatan, foje esperanton, sen ajna strikta regulo – li ja jam scias kiu parolas kiun lingvon kaj povas bone distingi tiujn du lingvojn. Li nun ne parolas multe Esperanton (sed kapablas esprimi sin, se li devas), sed bone komprenas la lingvon. Dum lastaj aranĝoj eksterlandanoj laŭdis lian lingvokapablecon (por mi estas malfacile taksu tion) kaj mi esperas ke li daŭre uzos la lingvon je E-aranĝoj kiujn ni planas foje partopreni.

Antaŭ ni nun estas la sekva tasko, post kelkaj semajnoj naskiĝos fratino de Vedran kun kiu mi denove parolos Esperanton kaj samtempe kun Vedran mi parolos ankoraŭ iom da tempo la lingvomiksaĵon antaŭ ol mi eku paroli nur kroate (krom dum E-aranĝoj, kompreneble).

**Vanja RADOVANOVIĆ**



## Festo familia: 17a de majo en Norvegio

Kial paroli pri nacia festo kiel familia festo? Ĉu tiam oni ne montras ĉarojn kaj aliajn signojn de forta armeo kaj fiera naciismo? Ne en Norvegio! La 17-a de majo estas tago de konstitucio de Norvegio. Praktike estas festo de infanoj kaj de popolo kun bonhumoraj procesioj surstrataj de mateno ĝis posttagmezo.

### Iom da historio

Nuna Norvegio estas rezulto de napoleonaj militoj. En 1814, dum packontrakto en Kiel, Danio perdis Norvegon pro dana kunlaboro kun Napoleono, kaj Svedio ricevis Norvegon parte kiel kompenson pro perdo de Finnlando al Rusio en 1808, parte rekompence pro sveda kontraŭado al Napoleono. La 17-an de majo 1814 estas decidita la konstitucio de Norvegio, kiu grandparte ankoraŭ validas hodiaŭ.

Norvegio, kiu festis sian 100-jaran sendependiĝon de Svedio en 2005, daŭre havas nacian tagon memore al sendependiĝo de Danio en 1814.

### Procesioj

La norvega nacia tago estas tago de senfinaj procesioj de infanoj, junuloj kaj civitanoj, ĉiuj bele vestitaj kaj gajaj. Ne estas hazardo ke *Wikipedia* ilustras artikolon pri la nacia tago norvega per bildo de infana procesio. Efektive, infanĝardenoj kaj bazlernejoj malfermas la procesian tagon, kutime je la 10-a horo matene. Infanoj paŝas kun siaj gepatroj kaj geinstruistoj, kriante *Hura!* dum ili svingas sian norvegan flageton ĉiufoje kiam ili rekonas konaton en la kompakta publiko. Post procesio de lernejoj kaj eĉ pli junaj infanoj, en ĉiu urbeto, povas esti kelkhora paŭzo. Tio sufiĉas por manĝi kolbasojn, eble ankaŭ glaciaĵon (ne en la nordo de la lando, kie neĝo povas ankoraŭ kuŝi ĉirkaŭurbe).

Poste venas procesio de mezlernejoj 18-jaraj, kiuj ŝercas kaj amuzigas publikon pro siaj primokoj de aktualaj famuloj. Ili ankaŭ disdonas siajn humorajn vizitkartojn al geknaboj, kaj tiutaga kolektado estas populara hobbio de junaj geknabetoj.

Finfine, je la 16-a horo ekiras la civitana procesio, konsistanta el ĉiaj kluboj de la urbo: fanfaroj kaj muzikgrupoj unue, danc-kluboj, sportemuloj, esperantistoj, plej diversaj kluboj kaj grupoj, ĉiu kun sia banderolo aŭ standardo. Kaj Hura-krioj dum kilometroj. En Oslo, la procesioj paŝas antaŭ la reĝa palaco, kaj la tuta reĝa familio estas sur balkono kaj man-salutas al la infanoj kaj al la popolo.

Post la civitana procesio, ĉiuj revenas hejmen kaj spektas en televido kiel oni festis ĉi-jare en aliaj partoj de la lando. Meze de

tago, inter du procesioj iu loka aŭ tutlanda famulo paroladas al la popolo en urbocentro. La temo estas ĝenerale inkludiga kaj pozitiva. La 17-a de majo ne taŭgas por polemikaĵoj, eĉ se politikisto paroladas.

En mia urbo, la E-klubo de kelkaj jaroj partoprenas la civitanan procesion, kaj ni estas proksimume same multe da plenkreskuloj kiom da infanoj! Post la procesio, ĉiuj esperantistoj kuniĝas ĉe maljuna klubanino kiu loĝas en urbocentro. Ŝi regalas nin per kukoj kaj bongustaj trinkaĵoj. Eĉ se ni iom frostis dumtage pro norda vento, estas agrabla etoso. Hura!

**Claude ROUGET**

Ĉu vi ŝatis tiun ci artikolon pri festo en Norvegio? Ankaŭ vi verku pri familia festo, nacia, religia aŭ civila en via lando: ekzemple karnavalo en Brazilo, Hanuka en Israelo, Divali en Barato, Tago de lernantoj en Rusio, Halloween en Usono, Sankta Nikolao en Belgio, ktp.



## UNICEF: infanoj plej bonfartas en Nederlando!

UNICEF *Innocenti Research Center* en Florenco (Italio) ĵus publikigis raporton pri infana bonfarto en riĉaj landoj. Estis komparataj multaj kriterioj en ses diversaj temoj: 1. materia bonfarto, 2. sano kaj sekureco, 3. eduka bonfarto, 4. familiaj rilatoj, 5. konduto kaj riskoj, 6. subjektiva bonfarto. Aŭtoroj de la raporto plurfoje montras kiom malfacile eblas kompari la landojn, parte pro manko de detalaj esploroj, parte pro tio ke sento de (mal)bonfarto ne rekte dependas de objektiva fakto, sed ofte de ĝenerala socio ĉirkaŭ la infanoj.

La esploristoj tamen asertas jenajn konkludojn. Nederlando estras tabelon de ĝenerala infana bonfarto, havante inter la 10 plej bonajn rezultojn por ĉiu el la menciitaj kriterioj. Nordeŭropaj landoj havas la plej altajn lokojn en tiu tabelo. Post Nederlando, plej bonfartas infanoj laŭ tiu raporto en Svedio, Danio, Finnlando, Hispanio, Svisio, Norvegio kaj Italio (en tiu vicordo). Tamen ĉiu lando havas siajn malfortajn flankojn kaj neniu lando sukcesas same bone en ĉiuj ses pristuditaj kriterioj. Laŭ la sama raporto, kaj el 21 pritraktataj landoj, la plej malbonfartaj landoj por infanoj estas Usono kaj Britio. Tiuj du landoj estas en la malplej alta triono por 5 el la 6 kriterioj.


UNICEF rimarkigas mem ke neniu unuopa dimensio de bonfarto estas fidinda mezuro en si mem de infana bonfarto. Riĉaj landoj troviĝas en tre diversaj pozicioj por diversaj kriterioj de infana bonfarto.

Eble tamen, tiu raporto estas plej interesa ĉar ĝi iel pravas ke ne estas evidenta rilato inter infana bonfarto kaj averaĝa enspezo pokapa. Aŭtoroj de la raporto montras ekzemplon de Ĉekio, kiu havas pli altan ĝeneralan nivelon de infana bonfarto ol ekzemple Francio, Aŭstrio, Usono kaj Britio. Norvega komitato de UNICEF rimarkis alian paradokson. Kvantkam Norvegio estras statistikon pri materia bonfarto de infanoj, nur 83% de norvegaj infanoj respondas ke ili kontentas pro sia vivo. Nur Portugalio kaj Pollando havas laŭ la raporto pli malkontentajn infanojn. Kompreneble ne

eblas konkludi ion firman el tio, ĉefe kiam estas tiom malmulte da diferencoj inter la "bonaj" kaj "malpli bonaj" landoj. Nederlandaj, grekaj kaj finnaj infanoj plej kontentas (pli ol 90%), dum 80% de la polaj infanoj ĝenerale kontentas pro sia vivo.

Mia franca deveno kaj kulturo igis min interesiĝi pri respondo de junuloj en diversaj landoj al demando: "Kiom ofte vi tagmanĝas kun viaj gepatroj dum semajno?". Tio certe estas kultura afero pri kiom gravas manĝi kune, sed UNICEF uzis tiun demandon kiel unu el bazoj por juĝi kvaliton de kvara kriterio, nome familiaj rilatoj. 90% de francaj 15-jaruloj respondaj ke ili tagmanĝas plurfoje semajne (italoj 95%) dum malpli ol du trionoj el usonaj, britaj kaj finnaj infanoj tagmanĝas plurfoje dum semajno kun siaj gepatroj. Alia interesa aspekto de familiaj rilatoj estas respondo de 15-jaruloj al demando "Ĝenerale, kiom ofte viaj gepatroj uzas tempon por paroli kun vi?" Ŝajnas ke hungaraj gepatroj plej zorgas pri siaj idoj. Vidu mem la tabelon sube.

Figure 4.2b Percentage of 15 year-olds whose parents spend time 'just talking to them' several times per week



La tutan raporton vi povas legi (nur anglelingve) kaj elŝuti el [www.unicef-icdc.org/publications/](http://www.unicef-icdc.org/publications/). Bonan trastudadon!

**Claude ROUGET**

## Kalendaro

Aperas ĉi tie nur renkontiĝoj ne menciitaj en artikoloj sur paĝoj 7-8.

majo 2007

**5a Familia MontKabana Renkontiĝo**  
(Kroatio) Pli da informoj aperos dum marto 2007 ĉe [www.keja.hr/mkr-familia-n.html](http://www.keja.hr/mkr-familia-n.html).

2007.07.22 – 08.04

**Renkonto de Esperantaj Familioj**  
(Hungario) Jam la 29-a REF. Estas atendataj ĉ. 20 familioj, kies infanoj almenaŭ komprenas Esperanton. Plenaj informoj en reto – kaj en venonta numero de FE – ĉe: [familioj.komputilo.org/REF/2007/](http://familioj.komputilo.org/REF/2007/)

2007.07.28 – 08.04

**Eŭropa Infana Kongreseto**  
(Slovenio) Tiu kongreseto okazos dum la 7-a Kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio kaj estas alternativo por tiuj kiuj ne povas veturi al IIK en Japanio... Precizaj informoj ĉe: [www.esperanto-maribor.si/programo\\_de\\_kongreseto.html](http://www.esperanto-maribor.si/programo_de_kongreseto.html)

## Desegnokonkurso pri Pasko

Ni organizas (Egerfarmos kaj Tiszafüred kune) desegnokonkurson okaze de Pasko por bazlernejanoj!

La infanoj povas desegni pri siaj Paskaj eventoj, laŭplaĉe, diversmaniere. Limdato: 01.04.2007. Sendu al: Blanár Gabriella, (ŝi estas la vilaĝestrino, kiu mem nun lernas Esperanton), Dóza Gy. 1, HU-3379 Egerfarmos, Hungario. Sur la dorso de la desegnaĵoj oni devas skribi siajn nomon, aĝon kaj adreson. Kategorioj: I.: 6-10 jaraj; II.: 11-15 jaraj. La desegnaĵoj estos prezentataj en la vilaĝa Esperanta domo, dum semajno de Pasko, kaj la vilaĝanoj de Egerfarmos mem estos la juĝantoj.

## Enketo

Karlijn Van Damme el Belgio kaj Tina Tišljarić el Kroatio pristudas denaskan multlingvecon (ankaŭ neesperantan) kaj petas vian helpon. Ili volas pristudi la lerneajn rezultojn de denaskaj multlingvuloj kaj vidi

ĉu havas iajn influojn aŭ ne. Tiucele ili pretigis enketilon kiu enhavas la ĉefajn jenajn demandojn: Sukceso en lernejo (averaĝa sukceso; lerneja lingvo; matematiko; aliaj fremdaj lingvoj; geografio). En kiu fako via infano plej sukcesas? Pri kio okupiĝas via infano ekster lernejo (muziko, sportumado, artoj, komputilo, ...)? Iom alispecaj demandoj por pli aĝaj infanoj kaj junuloj. Fine de januaro, la enketantinoj jam ricevis 25 respondojn. Sed ili esperas je minimume 60. La tutan enketilon vi povas peti retpoŝte de [gerd@esperanto.be](mailto:gerd@esperanto.be) aŭ [tinat@net.hr](mailto:tinat@net.hr).

## Novnaskit(in)o



Georges  
de La Tour  
(1593-1652):

Novnaskito  
(ĉ. 1645)

Rosa Caroline Grimley Evans naskiĝis la 15-an de januaro 2007, en Kembriĝo, Britio. Ŝi estas dua filino de Edmund kaj Kate Grimley Evans kaj fratino de dujara Isabel. La patro Edmund parolas Esperanton kaj la patrino Kate parolas la anglan kun ambaŭ filinoj. Ni gratulas la feliĉajn gepatrojn kaj ĝojan fratineton.

## Tux Paint en Esperanto?

*Tux Paint* estas senpaga desegnoprogramo por infanoj, kiu funkcias kun Linux, Mac kaj Windows. Ĝi ekzistas jam en 68 lingvoj, kaj programa teamo deziras ke *Tux Paint* ankaŭ estu tradukata al Esperanto. Miasperte (aŭ laŭ sperto de mia filino Aleksandra), indus traduki tiun programon. Tradukinto al norvega lingvo respondis al mi ke ne necesas pli ol unu vespero por traduki la 150 mallongajn frazojn de la programo. Elŝutu *Tux Paint* el [www.tuxpaint.org](http://www.tuxpaint.org) kaj juĝu mem ĉu indas traduki. – cr



## La novaj vizaĝoj de Rondo Familia

Pluraj el vi eble konas min kiel gvidanton aŭ komisiiton de Rondo Familia (RF). En 1998 mi "heredis" tiun taskon de Renato Corsetti, kiu fondis kaj vartis RFn dum multaj jaroj. Tiam Renato sentis ke liaj infanoj jam tro aĝas, kaj petis min transpreni la taskon. Baldaŭ mi venos al la sama stato, ĉar Renato, mia plej juna filo, baldaŭ havos "Bar Micva" (13 laŭ la juda religio)... sed antaŭ ol heredigi la respondecon al iu kun pli junaj infanoj, mi ŝatus resumi jardekon da aktiveco en RF kaj doni al ĝi novan impeton kaj energion.

Antaŭ ok jaroj mi skribis (en propono al la Komitato en la UK en Berlino): *"Mi kredas ke RF plenumas gravan rolon servante kiel ligilo inter familioj kaj generacioj... Mi kredas ke RF devas surprени eĉ pli grandan rolon ol tiun kiun ĝi plenumis ĝis nun, uzante ekzistantajn kaj novajn rimedojn, kaj tiucele prezentos du proponojn:*

*1. Revizii la Internacian Infanan Kongreseton (IIK), por ke ĝi fariĝu pli alloga kaj akirebla ĝuste al la familioj kiuj plej bezonas ĝin, kaj 2. Ŝanĝi la "Cirkulaĵon" – la bulteno por e-familioj – tiel ke ĝi estu abonbla (kaj aboninda) periodaĵo."*

Kiel organizanton de la IIK mi varbis Stefan McGill, kiu multe progresigis ĝin en have kaj administre. Sekve mi strebis por malaltigi la IIK-kotizon, por ke ĝi estu pli facile atingebla por infanoj de junaj familioj. Ekde la pasinta somero la IIK havas novan organizanton – Bert Schumann, kiu jam sukcese gvidis la IIKn en Florenco, kaj ĉi somere organizos la IIKn en Japanio. Paralele okazos Eŭropa Infana Kongreseto kadre de la kongreso de EEU (vidu paĝon 19).

La dua propono realiĝis paŝon post paŝo. Unue mi ŝanĝis la *Cirkulaĵo*-n al *Familia Esperanto* (FE) kaj invitis Katja Bodnarova esti ĝia unua redaktorino. Katja transformis la *Cirkulaĵo*-n en kvalitan periodaĵon. Kun la jaroj, ĝia sendolisto ŝvelis ĝis super 400 adresoj, kio kreis grandan deficiton. Ni sukcesis resanigi la financojn de FE per subvencio de fondaĵo Hodler kaj restrukturigo de la abonantaro. Por unu numero FE transiris al Brazilo, kun James Piton kiel redaktoro, sed nun, post dujara interrompo ĝi reaperas rete sub la klavaro de Claude Rouget. Ĝi estas videbla ĉe la nova retejo de RF kiun mi kreis lastatempe ĉe la UEA-paĝoj, kie oni povas viziti ankaŭ malnovajn numerojn de FE kaj la novan retejon de la IIK.

Alia aktiveco de RF kiun mi enkondukis dum la jaroj estas la Familia Forumo en la Universala Kongreso, kie kongresanoj kun familioj aŭ interesiĝantoj pri RF povas renkontiĝi kaj interŝanĝi spertojn.

Lastatempe la Estraro aprobis la novan konsiston de la komisiono de RF: krom la antaŭaj anoj Jouko Lindstedt (kunordiganto de la listo *DENASK-L*) kaj mi, estas en ĝi du novaj membroj, jam supre menciitaj: Bert Schumann (IIK) kaj Claude Rouget (FE).

Kion mi antaŭvidas kiel prioritataj taskoj por RF en la estonteco? Mi kredas ke unu el la plej gravaj celoj de RF (kaj fakte de la tuta Esperanto-movado) estas subteni kaj flegi la Esperanto-familiojn, per la kreo de bonaj kondiĉoj por internaciaj familiaj renkontiĝoj. Ni devas dediĉi apartan atenton por la infanoj, havigi al ili pli da okazoj taŭgaj por sperti Esperanton en internacia etoso. Tio povas esti decida por ilia percepto de Esperantujo: ĉu enuaj kunvenoj de olduloj aŭ mirakla mondo ankaŭ por infanoj.

Speciale grava estas la Internacia Infana Kongreseto. Ĝi donas al niaj esperantidoj la eblecon sperti internacian infanan etoson, kaj logas ilin al la E-socio. Mi havas tri bonajn pruvojn pri tio: miaj tri gefiloj, kiuj spertis plurajn Kongresetojn. Por povi pli bone plenumi tiujn celojn, ni devas plialtigi la subtenon por la IIK kadre de la kongresa fako de UEA. Oni devas garanti la okazigon de IIK aŭ/kaj infanvartejo, kaj informi pri ĝi sufiĉe frue – almenaŭ en la unua informilo kaj en la Revuo. Oni devas krei teamon de potencialaj gvidantoj de IIK, tiel ke la ŝarĝo ne falos ĉiam la sur la sama persono.

Ni intencas regule eldoni FE-n, kaj Esperanto-uzantaj familioj povas multe helpi per sendado de materialo: leteroj, artikoloj, personaj rakontoj kaj familiaj novaĵoj, kaj kompreneble fotoj kaj desegnaĵoj. Por familioj kiuj ne havas aliron al komputiloj kaj al la reto, ni konsideras ankaŭ paperan eldonon. Tio bezonas pliajn rimedojn, ĉar ofte la senretaj familioj estas ankaŭ senrimedaj, triamondaj, aŭ ne transpagipovaj, kiuj ne povas pagi la abonkotizon por la papera eldono. Por tio tre bonvenus se tiuj el vi kiuj ja havas la rimedojn (re)fariĝu abonantoj aŭ subtenantoj, per kontribuo de 10 eŭroj jare al la UEA-konto *idoj-p*.

**Amri Wandel**

("Malferme", Revuo Esperanto, aprila n-ro)